

ESPERANTLINGVA



NOVELBIBLIOTEKO

*redaktata*  
*de*  
*Leono Vienano*

N-o 2.

BOLESŁAW PRUS

LA VIZIO  
LA VEŜTO

# KION CELAS

## LA „Esperantlingva Novelbiblioteko”?

Havigi al la leganto novelojn:

1. **intereseĝajn** dank' al la altgrade aktuala kaj streĉa enhavo (koncerne la individuan kaj socian vivon) vortigita per granda arto de literatura talento.
2. **facilajn** dank' al la populara kaj simpla maniero de esprimado de la plej komplikaj pensoj, sentoj kaj problemoj.
3. **internaciajn**, prezentante la literaturajn kreaĵojn de diversaj nacioj.
4. verkitajn en **flua Korekta** Zamenhofa **stilo**, evitigante al la esperantistaro uzadon de lingvaj malĝustaĵoj kaj diskonigante imitindan stilon esperantan.

Se vi volas ĝui belon de literaturo kaj alproprigi al vi korektan stilon esperantan, legu atente la „**Esperantlingvan Novelbibliotekon**”.

# „Esperantlingva Novelbiblioteko“

redaktata de LEONO VIENANO.

N<sup>o</sup> 2.

B. P R U S

**La vizio.**

**La veŝto.**

El la pola originalo tradukis  
LIDJA ZAMENHOF

Eldonejo N. Szapiro, Warszawa, Nowolipki 8.

702818-B

Donaco de

no N. Szapiro, Warszawa.

116

32

# LA VIZIO

## I.

Dum vintra vespero, ĉirkaŭ la naŭa horo, doktoro Ĉerski, klinita super tablo, sidas en sia kabineto. Ĝi estas alta, dufenestra ĉambro. Laŭlonge de unu muro staras triobla biblioteka ŝranko, ĉe la alia — ŝranko kun ĥirurgiaj iloj. Ĉe unu fenestro vidiĝas kverka skribtablo, turnita per sia maldekstra flanko al la lumo, ĉe la alia — apogilo, kaj sur la apogilo — multekosta anatomia atlaso. En la mezo de la kabineto, sub pendanta lampo, troviĝas tablo, ĉe kiu laboras la doktoro. La ceteron de la ĉambro okupas pezaj brakseĝoj kaj seĝoj, tegitaj per ledoj.

La doktoro estas ĥirurgo. Morgaŭ li devas operacii gravan tuberon sur la kolo, do hodiaŭ, por ekzerco, li kopias el la atlaso tiun danĝeran por kuracistoj kaj malsanuloj korpoparton kun ĝia komplikita reto de vejnoj kaj nervoj.

La doktoro estas mezkreska kaj karakteriziĝas per malvarma trankvilo. Liaj konatoj diras pri li, ke

li havas ŝtonan fizionomion kaj ŝtalan rigardon. Li estas unu el plej bonaj ĥirurgoj. Li kvazaŭ vidas la internon de la korpo de malsanulo, kaj liaj iloj preskaŭ posedas senton, dank' al kio li laŭdire ankoraŭ neniam faris ian dangan eraron en operacio.

La ĉefa trajto de lia karaktero estas nefleksibla volo. Li estas filo de iam bonstata familio, sed kiam la patro perdis la havaĵon kaj mortis, la knabo komencis de la kvina klaso mem perlaboradi sian panon kaj vivtenadis ne sole sin mem, sed ankaŭ la patrinon. Malgraŭ gravaj malhelpoj li finis universitaton, estis dum kelkaj jaroj eksterlande kaj, reveninte en la patrujon, li rapide akiris praktikon kaj edziĝis kun fraŭlino, kiun li ekamis, estante ankoraŭ studento, kaj jam tiam decidis, ke ŝi estos lia edzino.

Alian karakterizan trajton de la eminenta kuracisto prezentis profunda pesimismo, kies fonton oni devas serĉi preskaŭ en lia infanaĝo. Kompaniano de la patro forrabis de li la havaĵon kaj lin mem enpelis en tombon kaj, kiam la patrino iris al la rabinto por elpeti almenaŭ parton de la mono por edukado de la filo, la rabulo donis al ŝi tian respondon:

— Kiu ne povas fini la lernejon, okupiĝu per metio. La socio ne bezonas pretendemajn duonklerulojn, sed bonajn laboristojn.

Post tiu rifuzo la malfeliĉa patrino petis helpon jen de sia familio, jen de siaj iamaj amikoj. Sed ĉiuj respondis la samon: ke Karlo ne devas plu pensi pri lernado, sed pri profitdona laboro.

Tia konduto de plej proksimaj, iam afablaj personoj, enskribis sin per sangaj literoj en la animo de la kuracisto kaj influis lian pluan vivon. Malafabuloj diradis, ke doktoro Ĉerski estis eminenta ĥirurgo tial, ke li forstrekis el sia vortaro la vorton „kompato”, kion li mem parte konfirmadis, dirante multfoje:

— Se mi volus kortuŝigi pro ĉiu larmo, kiun mi vidas, mi ne povus esti ne nur ĥirurgo, sed eĉ fratino-flegistino.

Malgraŭ tio li estis homo honesta, kaj ne sole kuracadis senpage malriĉulojn, sed plie—lia domo estis fama, kiel hejmo, kie trovis helpon tre multaj personoj, familioj kaj institucioj. La kaŭzo de tio ĉi estis lia edzino.

Kiam kelkaj el pli intimaj konatoj demandis lin, kiel oni povas ligi lian grandan oferemon kun la malafablaj aforismoj, li respondis:

—Filantropio estas la fako de mia edzino. La virino amuzu sin, se tio estas por ŝi agrabla.

— Ne kalumniu vin mem, doktoro!

— Mi tute ne kalumnias min. En la bonfarado de mia edzino mi ludas nenian rolon. Mi nur penas ne agadi malbone: mi ne ŝtelas, ne mortigas, ne veturas per vagonaroj sen biletoj... Tiajn plaĉojn mi havas.

La doktoro plene harmoniis kun sia kabineto, kiu aspektis preskaŭ malserene, kvazaŭ ĉiu el la esplorataj pacientoj lasus tie parton de sia malĝojo kaj maltrankvilo,

## II.

En tiu momento ekkraketis la pordo kaj sur la tapiŝo aŭdiĝis bruo de silka vesto.

— Ĉu tio estas vi, Zonjo? — demandis la doktoro, levante la kapon de super la desegnaĵo.

— Mi jam veturos al la patrino — diris la sinjorino per mallaŭtigita voĉo — kaj kun ŝi mi veturos al gesinjoroj Viktoroj. Ĉu mi malhelpis al vi? Pardonu!

Ŝi ĉirkaŭprenis lian kolon kaj kovris la vizaĝon per kisoj. En sia hela vesto ŝi aspektis apud li kiel floro, premanta sin al statuo.

Ŝi estis virino alta, eleganta, kun dikaj sed belaj trajtoj, kiujn lumigadis esprimo de dolĉeco. La edzo, kiun ŝi adoris, fileto, por kiu ŝi estis preta ĉiumomente fordoni la vivon, diversaj suferantoj kaj senhavigitoj — jen estis la regno, kie ŝi agadis.

— Do kiam vi venos por min kunpreni? — ŝi diris — kaj eble vi tute ne venos, ĉar mi vidas, ke vi estas tre okupita? Gesinjorojn Viktorojn vizitos hodiaŭ kelkaj personoj speciale por koniĝi kun vi.

— Ĉu ili pensas, ke kiam mi koniĝos kun ili, mi farados al ili operaciojn pli bone kaj malpli kare?

— Ne parolu tiel, ĉar tio estas malbela, Karlo! Kaj eble vi preferus, ke mi restu hejme, ĝis vi estos libera.

— Iru, mia infano, kaj amuziĝu bone. Se nenio okazos, mi venos vin kunpreni ĉirkaŭ la dekdua.



— Bone; do kisu Kaziĉjon, ĉar li volas diri al la paĉjo „bonan nokton”.

— Je tiu ĉi horo la knabo ankoraŭ ne dormas? — ekmiris la doktoro — mi tuj iros al li.

La edzino denove kisis lin, dirante:

— Ĝis baldaŭa revido. Mi konfidas vin ambaŭ al Dio.

— Bona protekto ĝi estas — ekmurmuris la doktoro.

La edzino kovris al li la buŝon per la mano.

— Se vi min almenaŭ iomete amas, neniam diru ion similan, Karlo! — ŝi diris timigite. Kelfoje vi parolas, kvazaŭ vi ne kredus...

— Kaj tamen estus ja tute facile forigi ĉian nekredon el la mondo. Unu signo, unu malgranda pruvo de ekzisto... Kian malutilon ĝi farus al Dio?

— Ho, ne parolu tiel — denove interrompis al li la edzino kun kreskanta timo. — La signoj de Dio estas teruraj, kaj oni ne devas ilin provoki.

— Iru, mia kara — interrompis la doktoro — iru kaj amuzigu bone post nia monaĥeja enuado.

Li kisis ŝin, akompanis al la pordo kaj poste revenis al sia tablo. Ree li klinis la kapon super la desegnaĵo, sed tuj li levis ĝin, atentigita de ia brueto.

Ĝi estis seka neĝo, kiu faladis ekstere kaj frapis la fenestrojn. Ifoje povus ŝajni, ke petolemaj infanoj ŝutas sablon sur la vitrojn, jen — ke iu mal-laŭte frapetas sur la fenestrojn, kvazaŭ li volus elvoki la doktoron, aŭ anonci, ke li mem venos al li.

Al la doktoro ŝajnis, ke ĉe tiu bruo de la ne-  
ĝo li vidas etajn, rozajn fingretojn, kiu tamburetas  
sur la vitroj. Li rememoris la filon, ridetis kaj for-  
lasis la kabineton.

En granda ĉambro, ĉe lumo de pale - blua  
lampo dormis Kaziĉjo, zorgata de infanistino.

— Kaziĉjo tiel atendis la paĉjon, tiel atendis...  
li tute ne volis senvestiĝi, kaj ankoraŭ postulis, ke  
mi lin veku, se li endormiĝus — flustris la infan-  
istino ridetante — li volis diri al la paĉjo „bonan  
nokton“, kaj montri la novan arlekenon, kiun hodiaŭ  
donacis al li la avinjo. Kaj li diris ankoraŭ, ke se  
la paĉjo deziras, li donacos al la paĉjo la arleken-  
on, ĉar ĝi estas la plej bela ludilo, kiun Kaziĉjo  
iam ricevis. Por li ĉiu nova ludilo estas la plej  
bela.

Post tiu ĉi raporto la infanistino eliris, kaj la  
doktoro fikse rigardis la dormantan filon.

— Kiel infanoj ŝanĝiĝas — pensis la doktoro—  
Kiam ĉi tiu etulo venis en la mondon, li estis tiel  
malbela, ke mi dubis, ĉu mi povos lin iam ekami.  
Poste li iom beliĝis kaj komencis min interesi—kaj  
hodiaŭ li estas belega, kiel kerubo, mia plej kara  
trezoro. Ne mirinde — li havas la malhelajn okulojn  
de la patrino kaj ŝian rideton.

En la kapon de la doktoro venis la penso, ke  
tiu ĉi infano estas la sola kreitaĵo, kiu lin amas sen  
ombro de egoismo. Kiel li ĉiam adiaŭas la forir-  
antan paĉjon! Kiel li petas sin sidigadi apud fenestro  
por vidi pli baldaŭ la revenantan paĉjon! Kiel li te-

rure sopiris, kiam la paĉjo devis foje forveturi por kelkaj tagoj!

— Neniam mi pensus, ke infano povas doni tiom da feliĉo — ekflustris la doktoro, profunde kortuŝita.

Subite lia rigardo falis sur bildon, kiu pendis super la liteto de Kaziĉjo. Ĝi estis donaco de la avino: belega angla kuprogravuraĵo, prezentanta Kriston. La Savinto sidis sur roko, surkreskita de floroj, post Li de malproksime tiris sin monta ĉeno kaj vojo, kies komencon kovris la vesto de la Savinto. La vizaĝo de Kristo estis eksterordinare belega, ĝi havis esprimon malgajan kaj ordonan, kiu tre bone harmoniis kun surskribo, metita sub la bildo per la mano de la avino: „Amu viajn malamikojn, bonfaru al tiuj, kiuj vin malamas kaj persekutas...”

— Mirindaj vortoj — parolis al si mem la doktoro. Ilin povis diri nur tiu Saĝulo, kies okuloj vidas ian alian mondon, ne la nian. Ĉar kian sorton havus en tiu ĉi mondo homo, pri kiu oni eksciis, ke li „amas siajn malamikojn”? Antaŭ la sekvanta tago restus al li unu sola ĉemizo, kaj en la daŭro de semajno oni elverŝus el li la tutan sangon.

— Ne, fileto — li ekflustris, kliniĝante super la lito, — ne amu viajn malamikojn kaj ne bonfaru al tiuj, kiuj vin malamas. Alie ekmankos al vi koro kaj fortoj por tiuj, kiuj vin amas.

— Ne faru tion, fileto, ne, ne!

En la sama momento elektra sonorilo en la

antaŭĉambro eksonis tiel neordinare, ke la doktoro, mirigita, revenis en la kabineton.

— Jam estas preskaŭ la deka... kio povus al iu okazi? — li diris al si mem.

### III.

En la kabineton eniris maljuna homo kun longaj haroj kaj senorda barbo. Li estis vestita per eluzita mantelo, multloke blankigita de neĝeroj.

Ekvidinte lin, la doktoro ekpaŝis malantaŭen kaj demandis per tono, en kiu estis sentebla kolero kaj miro:

— Kio venigis vin al mi... je tiu ĉi horo?

— Krupo... — ekflustris la maljunulo — mia nepeto havas krupon... li sufokiĝas...

La doktoro ekmovis la ŝultrojn. La maljunulo vidante ĉi tion, malespere kunplektis la manojn kaj komencis paroli per raŭka voĉo:

— Sinjoro! estu kompatema! Vere, mi rabis de vi la havaĵon... Se vi volas, mi tion konfesos antaŭ juĝisto... Sed kian profiton mi havas de tio? — Mizeron... Mia filino, vidvino, vivtenas sin per kudrado, kaj havas nek sanon, nek laboron. Mi estas por vi krimulo, sed... kion kulpis la infano!? Ĝi havas nur ses jarojn... Kaj ĉu ĝi devas suferi tiel terure tial, ke la avo estas krimulo? Batu min, metu min en malliberejon, sed kompatu la senkulpulojn! Kristo ja eĉ sur la kruco pardonis al siaj ekzekutintoj...

— Aŭskultu min — diris la doktoro. -- Kie!

kuracisto mi rajtas al neniu rifuzi helpon, sed kiel homo...

Li kaptis la spiron kaj parolis plu:

— Ĉu vi povas ĉi-momente enkudriligi fadenon.

— Vi ja vidas, kiel mi tremas... — respondis la maljunulo, rigardante en liajn okulojn kun timego de batota hundo.

— Komprenu min, sinjoro — kontinuigis la kuracisto. — Al ĉiu alia infano mi farus operacion, krom al mia propra kaj al via. Ĉe la via mi ne estus certa pri mia mano, ĉar ŝajnas al mi, ke anstataŭ unu ĉerko, la ĉerko de mia patro, inter mi kaj vi troviĝus ankaŭ la dua — de via nepo... ĉu vi tion komprenas?

— Mi komprenas, ke Dio min malbenis!

— Serĉu do alian kuraciston... La honorarion... mi povas pagi...

— Ne estas jam tempo — parolis la maljunulo, kunmetante la manojn. — Ni loĝas proksime, en apuda domo. Mi ne povas jam iri pluen. Ĉe tiom da kuracistoj mi estis vane...

— Iru ankoraŭ al unu — respondis malvarme la doktoro.

La maljunulo, kvazaŭ freneza, komencis skui la manojn en la aero kaj bati la kapon.

— Mi iros — li diris — mi iros al mia agonianta nepo kaj preĝos, ke por pekoj de maljunuloj oni ne punu infanojn... Dio, kompatu... Dio... Dio.. kompatu! — li ekkriis.

Sanceliĝante li eliris el la ĉambro kaj post momento pezpaŝe malsuprenkuris de la ŝtuparo.

— Bonega li estas! — ekkriis la kuracisto. — Antaŭ jaroj li rabis de mi la havaĵon kaj mortigis mian patron, kaj hodiaŭ li volus malbonigi al mi la reputacion. Tiun pacienton mi neniam tuŝus! Li alportus al mi malfeliĉon, same kiel lia nobla avo. Finite! Finite!

La eminenta ĥirurgo estis tiel emociita, ke li tremis.

#### IV.

La doktoro komencis paŝi laŭlonge de la kabineto kaj murmuri:

— Krupo... aĉa okazo... Por kio venis ĉi tien tiu maljunulo? Mi estas certa, ke lia tuta malpura vesto estas trapenetrita de la infekto. Jen estas la ordo de la mondo! La krimulo, kiam li havis forton, rabis de mi la patron kaj havaĵon, kaj hodiaŭ, maljuniĝinte, li infektiĝas kaj atakas mian hejmon.

La doktoro iris al la lavujo kaj lavis la manojn per malforta solvaĵo de sublimato. Poste li prenis ŝprucigilon, plenigis ĝin per fortodora fluidaĵo kaj, vokinte la lakeon, lasis sin surŝprucigi de la piedoj ĝis la kapo.

La vorto „krupo“ tiel lin maltrankviligis, ke li volis nepre rigardi Kaziĉjon, kaj timis samtempe, ke la infekto ne transportiĝu al lia filo. Ankoraŭ foje li lavis la manojn, ŝanĝis la surtuton, kaj flustrinte: „sensencaĵo“, iris en la dormoĉambbron de la infano. Mirigis lin tio, ke kvankam li multfoje komunikadis

ŝin senpere kun pacientoj, infekte malsanaj, nur hodiaŭ li ektimis, ke lia filo povus infektiĝi.

La infano dormis trankvile, sed en la emociita imago de la doktoro komencis aperadi nedifinitaj suspektoj. Ĉu Kaziĉjo ne tro rapide spiras? Ne tre, sed iomete tro rapide... Ĉu liaj vangoj ne estas tre ruĝaj? Ĉu en la fizionomio ne vidiĝas tiu malagraba esprimo, kiu anoncas malsanon?

Ne. La infano dormas kviete; ŝajnas, ke ĝi eĉ ridetas.

Malgraŭvole levis la doktoro la kapon kaj rigardis la kuprogravuraĵon, prezentantan Kriston. Subite li ekŝanceliĝis. Li frotis la okulojn kaj legis la surskribon:

„Amu viajn malamikojn... bonfaru al tiuj, kiuj vin malamas kaj persekutas...”

La roko, surkreskita de floroj, restis. La montĉeno en la profundo restis... Kaj estas videbla la vojo, ta tuta vojo... eĉ tiu ĝia parto, kiun kovris la vesto de Kristo... Eĉ tiu arbusto sur la roko, kiun ĝis nun neniu el vivantoj vidis, nek povis vidi, ĉar tiu arbusto ankaŭ estis kovrita per la maniko de la Savinto. Sed nun videbla estas jam la tuta vojo, eĉ la arbusto, kiun nenio plu kovras, ĉar Kristo... malaperis!

En la unua momento la doktoro ne estis eĉ mirigita. Ŝajnis al li, ke ĝuste tiel devas esti, ke Kristo estis tie superflua. Sed ree li rigardis la surskribon: „Amu viajn malamikojn“, kiu ne povis ja koncerni la solan pejzaĝon. Kaj fine tiu pejzaĝo sen

la homo, la pejzaĝo, kiun la doktoro rigardadis ĉiutage de ses jaroj, kaj sur kiu ĉiam estis Kristo kun vizaĝe ordona kaj malĝoja, kaj kun okuloj, enrigardantaj alian mondon...

Nun la doktoro eksentis sin en tia animstato, pri kiu li ĝis nun neniam eĉ pensis. Naskiĝis en li nova, ne sole nekonata, sed eĉ neniam antaŭsentita sento. Li deprenis la gravuraĵon de la muro, palpigian kadron, vitron... Li transportis ĝin en la kabineton kaj tie rigardis ĝin atente ĉe forta lumo de la lampo.

Sed ĉio estis vana: Kristo ne estis tie plu.

Subite venis en lian kapon la terura ideo, ke li estas freneza. Li volis ĵeti teren la bildon, kunvoki la servistojn, venigi kuracistojn, kaj eĉ kuri sur straton kaj krii:

— Rigardu, kio kun mi okazis! Mi ja perdas la prudenton!

Sed li rememoris pri la edzino, kaj tio lin rekonsciigis. Li akiris almenaŭ parte la sinregadon kaj decidis moderi sian frenezon, ke la edzino ne rimarku tion tuj, sed pretiĝu iom post iom al la malfeliĉo.

La edzino! Ĉu ne la edzino riproĉis al li antaŭ duonhoro nekredemon kaj, kiam li aludis pri bezono de iu signo flanke de Dio, ĉu ne ŝi diris, ke la signoj de Dio estas teruraj kaj ke oni ne devas ilin provoki?

— Signoj? Do tio ĉi povus esti signo — flustris li per blankiĝintaj lipoj. — Signoj de kio? Ke



oni devas ami malamikojn? ke oni devas bonfari al tiuj, kiuj agis kontraŭ ni maljuste?... ke... oni devas iri al tiu maljunulo kaj savi lian nepon?

Li metis la gravuraĵon sur la tablon, kovris ĝin per paperoj kaj, kurinte al la ŝranketo, komencis rapide elprenadi ilojn kaj bandaĝojn, ripetante maŝine kaj sence: „Sublimato... vato..., tubetoj... kudriloj... pasamento... jes, pasamento...“

— Mi devas savi tiun kompatindan infanon, kaj eble kune kun ĝi mi savos mian prudenton!

Estis apenaŭ kvarono post la deka, kiam la doktoro sonorigis al plej proksima subĥirurgio, kiun li konis.

— Ĉu vi povas asisti min ĉe traĥeotomio? — li demandis la subĥirurgon.

— Se vi eĉ, sinjoro doktoro, volus fortranĉi al mi la kapon, kaj poste realkudri ĝin, mi aukaŭ assistus!“ — ekkriis la subĥirurgo, ravita per la tasko, kiun proponis al li la eminenta kuracisto.

## V

La doktoro kaj la subĥirurgo facile trovis la loĝejon de la maljunulo kaj lia filino kaj samtempe eksciis, ke la serĉataj de ili loĝantoj estas tre malriĉaj. La domgardisto, ricevinte de la doktoro kelkajn kopekojn, elokventiĝis kaj rakontis, ke tiuj gesinjoroj ŝuldas por karbo, faruno kaj pano; ĉar ili ankaŭ ne pagas la luopagon, la dommastro forpelos ilin el la loĝejo la plej proksiman okan de monato.

— Diru al la dommastro kaj al la butikisto, ke tiuj gesinjoroj ĉion pagos — diris la doktoro.

— Kaj ĉu vi scias, kiu garantias — ekkriis al la gardisto la subĥirurgo. — La plej lerta doktoro en Varsovio, al kiu tiaj homoj, kiel via mastro, ne indus purigi la ŝuojn!

— Ne estu tiel fervora, kolego — admonis lin la doktoro per malkontenta tono. — Morgaŭ—li reparolis al la gardisto — la kalkuloj de tiuj gesinjoroj estos pagitaj, kaj dume vi ankaŭ servu al ili kaj vi estos rekompencita.

Tiel parolante, la doktoro aŭskultis siajn proprajn vortojn por esplori, ĉu ili estas logikaj. Li devis konfesi, ke, kvankam ilia enhavo estis nova, ili elmontris tamen neniajn signojn de frenezo.

La maljunulo kaj lia filino okupis unu malgrandan ĉambreton sur la tria etaĝo. Enirinte tien, la doktoro rimarkis, ke en la loĝejo estas malvarme, kaj ke nek sur la kameno, nek sur la tablo vidiĝas almenaŭ restaĵoj de ia nutraĵo.

Sur unu lito kuŝis la maljunulo, kovrante la kapon per la manoj; sur la alia sidis virino, iam eleganta, nun mizeriĝinta, kun sesjara infano en la brakoj. La infano havis vizaĝon tre ruĝan, ŝvelintan kolon, malfacilan spiradon kaj tuson similan al bojado. Kelkfoje la spirado tute haltadis, kaj tiam la infano per maltrankvilaj movoj etendadis la manojn al la malesperanta patrino, aŭ ŝiris sur si la malnovan vesteton. Oni povus pensi, ke ĝi jam agonias.

Kiam la doktoro kaj post li la subĥirurgo aper-

is en la ĉambro, la virino ekkriis pro ĝojo kaj la maljunulo saltleviĝis, sidiĝis sur la lito kaj per senpensaj okuloj rigardis la venintojn.

Patro... Dio kompatema... Joĉjo estos savita... — parolis la virino.

Sed post momento nova timo ekregis ŝin:

— Ĉu la operacio estas nepra, sinjoro? ĉar...

— Leonjo — respondis la maljunulo. — vi ja scias, vi mem postulis operacion... vi ja vidas, en kia stato li estas.

— Do mi ĉeestos ĝin, mi devas ĝin ĉeesti... mi lin tenos... — ekkriis ŝi decide:

— Pardonu — interrompis la doktoro, reakirante sian ordinaran trankvilon, kiu kun nevenkebla forto ĉiam influadis malsanulojn kaj iliajn familianojn — ĉu estos necesa operacio kaj kia, pri tio ni devas ankoraŭ konvinkiĝi. Dume bonvolu al mi havigi... varmegan kamomilon.

— Mi ne havas varmegan akvon, nek kamomilon... — flustris la virino.

— Turnu vin do al la domgardisto, kiu faciligos tiun ĉi aferon. Mi dume esploros la knabon.

— Terura stato, ĉu ne vere, sinjoro?

— Por patrino — jes, por' kuracisto — ne. Mi rememorigas pri varmega kamomilo.

La virino elkuris el la ĉambro, kaj la subĥirurgo tuj malfermis grandan skatolon, kiun li estis kunportinta, kaj komencis eligadi el ĝi ilojn, bandaĝojn kaj eĉ botelegon da akvo.

— Sinjoro — diris la doktoro al la maljunulo—  
la operacio estas necesa, kaj ni tuj ĝin faros.

— Ĉu vi ne atendos mian filinon?

— Mi ne pensas, ke ŝia ĉeesto helpos al ni.

La subĥirurgo ekbruligis lampeton, provizitan je reflektilo kaj refraktilo, ĵetis sur la tableton kelkoble kunmetitan kovrilon, sur tion — kusenon, kaj sur ilin metis zorgeme la apenaŭ spiregantitan infanon. Vidante tion ĉi, la maljunulo falis sur sian mizeran litajon kaj, plorgemante, ĉirkaŭvolvis la kapon per sia mantelo.

Dume lia filino kuris malsupren al la pordisto, petegis timeme, ke li bonvolu prunti al ŝi varmegan kamomilon kaj, garantiis per honorvorto, ke kiam ŝia fileto resaniĝos, ŝi tuj komencos labori, pagos ĉiujn ŝuldojn, kaj antaŭ ĉio — tion, kion ŝi ŝuldas al li, al la gardisto.

Granda estis tamen ŝia miro, kiam la gardisto deprenis antaŭ ŝi la ĉapon, petis, ke ŝi bonvolu sidigi, kaj diris, ke li ĉion faros por ŝi volonte, ĉar la sinjoro doktoro certigis, ke ilia kalkulo en la butikoj kaj la ŝuldo por la loĝejo estos jam morgaŭ pagitaj.

Dirante tion ĉi, la gardisto disblovis fajron en malgranda fajrujo kaj boligis akvon, antaŭ ol lia edzino alportis el apoteko kamomilon.

Ricevinte la varmegan kamomilon, la kompatinda patrino portis ĝin supren. Sed ŝia koro senmoviĝadis ĉe la penso, ke ĝuste nun atendas ŝin la plej malfacila momento. Ŝi ŝajne jam estis decidita je la

operacio, sed en la kritika momento ŝi eksentis, ke ŝi perdas la kuraĝon. Kion ŝi faros, se la doktoro diras, ke la operacio estas nepra? Oni buĉos la infanon antaŭ ŝiaj okuloj. Dio kompatema!

Ŝi ekstaris sur la sojlo kaj per simplenaj okuloj rigardis la ĉambron. La subĥirurgo lavis la manojn apud la kameno, la doktoro ion esploris ĉe tre luma lampo, ŝia patro, sidante sur la lito, ridetis senpense.

Kaj sur la dua lito kuŝis Joĉjo. Lia vizaĝeto, anstataŭ ruĝa, estis pala, li havis bandaĝitan kolon, sed ne baraktis plu, aspektis pli trankvile, kaj antaŭ ĉio — ne spiregis tiel terure, kiel antaŭ ŝia foriro.

— Nenia operacio estos jam necesa — ekparolis la doktoro. — Malgranda tranĉo estas jam farita, kaj mi estas preskaŭ certa, ke la infano estos sana.

La virino aŭskultis ravita, ne kredante al siaj oreloj.

— Mia helpanto — kontinuigis la doktoro — restos tie ĉi dum la nokto, kaj li ŝanĝados la bandaĝon, ne vi. Se okazos io grava, pri kio mi dubas, li sciigos min. Morgaŭ vi kun la patro kaj la infano translokiĝos en kuracejon. Vi ĉiuj bezonas komforton kaj ripozon, kiun oni ne povas havi en tiu ĉi loĝejo.

— Ni ne havas monon por kuracejo — flustris la virino kun timo, proksimiĝante surfingre al la infano.

— Vi havos, kaj ĉion vi pagos mem, el viaj propraj enspezoj, tiel vi, kiel via patro.

Dirinte tion ĉi, la doktoro surmetis la mantelon, surtiris la ĉapon sur la kapon kaj rapide eliris el la ĉambro. Sed sur la ŝtuparo iu haltigis lin: tio estis la maljunulo. Li surgenuiĝis antaŭ la kuracisto kaj plorante kisis liajn manojn.

## VI.

Ĉerski revenis hejmen preskaŭ gaja. En la daŭro de ne pli, ol unu horo, trafis lin kelkaj eksterordinaraj okazoj, el kiuj, se li rajtas juĝi, li eliris—se ne venke — almenaŭ neriproĉinde.

Se la mirinda okazo kun la gravuraĵo estis halucinacio, neniel tamen la doktoro estis minacata de frenezigo. Ĉar li ne sole ne perdis eĉ por momento la konscion kaj prudenton, sed leviĝis sur ankoraŭ pli altan ŝtupon de morala evolucio, kaj tio ne estas frenezo.

Kaj se la malapero de la Kristobildo estis la „signo”, ankaŭ tiuokaze nenio devus al li minaci. Li ja plenumis la ordonon, bonfarante al tiuj, kiuj agis maljuste kontraŭ li.

Malgraŭ tiel prava rezonado la doktoro, proksimiĝante al sia loĝejo, sentis kreskantan maltrankvilon.

Kaj se la figuro de Kristo malaperis, ĉe la kuprogravuraĵo, efektive malaperis, senrevene malaperis, tiam...kio? Tiu terura gravuraĵo devos esti kaŝita de la edzino, kiu ĝin konsideris unu el plej karaj relikvoj, ĝi devos esti kaŝita de Kaziĉjo, kiu ĉiutage, matene kaj vespere, diradis antaŭ ĝi siajn mallongajn

preĝetojn. Kaj tiuokaze Kristo estus pereinta ne sole por li, sed por tiuj, kiujn li plej multe amas.

La doktoro malfermis la pordon de sia antaŭĉambro, fordonis la mantelon kaj ĉapelon al la servisto, kaj, kolektinte sian tutan kuraĝon, eniris per decida paŝo en la kabineton. En tiu momento ŝajnis al li, ke li iras kontraŭ ion, kio estas pli terura, ol la morto mem, ke li kvazaŭ ludas paron-maiparon por animsavo aŭ kondamno. Ĉar, ĉu malgraŭ ĉiuj teorioj kaj filozofiaj sistemoj, ne meritis titolon de malbenito tiu, el kies domo en tiel neordinara maniero foriĝis Kristo?

La doktoro proksimiĝis al la tablo, per nerva movo forĵetis la paperojn, kovrantajn la gravuraĵon, kaj rigardis.

Sur la roko, kovrita de floroj, sidis Kristo kaj rigardis la honestan nekredulon per saĝaj kaj malgajaj okuloj, en kiuj bruletis misteroj de senlimeco.

Do Li ree estas ĉi tie, ree rigardas do Li ne forlasis lian hejmon kaj ne ĉesos kortuŝe benadi lian laboradon, lian bonan edzinon kaj senkulpan infanon.

## L A V E Ŝ T O:

Estas homoj, kiuj havas emon al kolektado de kuriozaĵoj pli aŭ malpli multekostaj, depende de materiala stato de la persono. Mi ankaŭ posedas kolekton, sed negrandan, kiel ordinare en la komenco.

Estas tie mia dramo, kiun mi skribis ankoraŭ en gimnazio, dum lecionoj de la latina lingvo... estas kelkaj sekigitaj floroj, kiujn mi devos anstataŭigi per novaj, estas...

Ŝajnas, ke jam estas nenio plu, krom unu tre malnova kaj eluzita veŝto.

Jen ĝi estas. La antaŭa parto estas senkoloriĝinta, la malantaŭa — trafrotita. Multe da makuloj, mankas butonoj, ĉe la rando jen trueto, certe elbruligita per cigaredo. Sed plej interesaj estas la kuntiriloj. Tiu, sur kiu troviĝas la buko, estas mallongigita kaj alkudrita al la veŝto tute ne tajlore, kaj la alia estas trapikita preskaŭ tutlonge de la bukodentoj.

Rigardante ĝin oni tuj divenas, ke la posedinto



de la veŝto certe ĉiutage pli malgrasiĝadis, gis li fine atingis tiun gradon, ĉe kiu veŝto ĉesas esti necesa, sed anstataŭe tre necesa montriĝas ĝiskole butonumata frako el magazeno de funebraĵoj.

Mi konfesas, ke mi hodiaŭ volonte forvendus al iu tiun ĉi pecon da drapo, kiu kaŭzas al mi iom da embaraso. Ŝrankojn por la kolektoj mi ankoraŭ ne havas, kaj mi ne volus teni la malsanan veŝtaĉon inter miaj propraj vestoj. Estis tamen tempo, ke mi ĝin aĉetis por prezo, multe superanta ĝian valoron, kaj mi pagus eble eĉ pli multe, se la vendisto scius marĉandi.

Oni havas kelkfoje en la vivo tiajn momentojn, ke oni ŝatas ĉirkaŭigadi sin per objektoj, kiuj remorigas malĝojon. Tiu malĝojo nestiĝis ne ĉe mi, sed en la loĝejo de la proksimaj najbaroj. El mia fenestro mi povis ĉiutage rigardi en la internon de ilia ĉambreto.

Ankoraŭ en aprilo ili estis triope: la sinjoro, la sinjorino kaj malgranda servistino, kiu dormadis, kiel mi scias, sur kofreto post ŝranko. La ŝranko estis malhele ĉerizkolora.

En julio, se la memoro min ne trompas, ili restis nur duope: la sinjoro kaj la sinjorino, ĉar la servistino translokiĝis al tiaj gesinjoroj, kiuj pagis al ŝi tri rublojn jare kaj ĉiutage kuiradis tagmanĝon.

En oktobro restis jam nur la sinjorino — tute sola. Ĝustadire, ne tute sola, ĉar en la ĉambro troviĝis ankoraŭ multaj mebloj: du litoj, tablo, ŝranko... Sed en la komenco de novembro oni aŭkcivendis la

senbezonaĵojn, kaj el ĉiuj memoraĵoj pri la edzo restis al la sinjorino nur la veŝto, kiun mi nune posedas.

Sed unu tagon, en la fino de novembro, la sinjorino vokis en la malplenan loĝejon komerciston de malnovaĵoj kaj vendis al li sian ombrelon por tridek kop-ekoj kaj la veŝton de la edzo—por dudek. Poste ŝi ŝlosis la loĝejon, pasis malrapide tra la korto, rigardis momente la fenestron, iam ŝian, sur kiun nun faladis malgrandaj neĝeroj, — kaj malaperis post la pordego. Sur la korto restis la komercisto de malnovaĵoj. Li suprenlevis la grandan kolumon de sia kapoto, metis sub la brakon la ĵus aĉetitan ombrelon kaj, ĉirkaŭvolvinte per la veŝto la manojn, ruĝajn pro malvarmo, li vokis:

— Mi komercas, sinjoroj, mi komercas!

Mi alvokis lin.

— Ĉu via moŝto havas ion por vendi?—demandis li enirante.

— Ne, mi volas de vi ion aĉeti.

— Certe via moŝto volas la ombrelon — diris la komercisto

Li ĵetis teren la veŝton, forskuis neĝon de la kolumo kaj komencis peneghe malfermi la ombrelon.

— Bela objekto! — li diris. — Por tia neĝo bonege taŭgas tia ombrelo. Mi scias, ke via moŝto povas havi tute silkan ombrelon, kaj eĉ du. Sed tio taŭgas nur por somero.

— Kiom vi volas por la veŝto? — mi demandis.

— Por kia veŝto? — respondis li mirigite, certe pensante pri la propra.

Sed tuj li ekmemoris kaj rapide levis la veŝton, kuŝantan sur la planko.

— Por tiu ĉi vesto? via moŝto demandas pri tiu ĉi veŝto?

Kaj poste, kvazaŭ vekiĝus en li suspekto, li demandis:

— Por kio via moŝto bezonas tiun ĉi veŝton?

— Kiom vi volas por ĝi?

La flavaj okulblankaĵoj de la komercisto ekbrilis kaj la pinto de lia longa nazo iĝis ankoraŭ pli ruĝa.

— Via moŝto pagu... rubleton! — respondis li, tiel etendante la vendotajon antaŭ miaj okuloj, por vidigi ĉiujn ĝiajn bonajn kvalitojn.

— Mi pagos al vi duonon da rublo.

— Duonon da rublo por tia veŝto?—tio ne povas esti—parolis la komercisto.

— Nek unu groŝon pli.

— Ne ŝercu, via moŝto — diris li, frapetante per la mano mian brakon. — Vi ja mem scias, kiom ĝi valoras. Ĝi ja ne estas veŝto por malgranda infano, ĝi estas por matura persono...

— Nu, se vi ne povas vendi ĝin por duono da rublo, foriru. Mi ne donos pli multe.

— Nur ne koleru, — inrerrompis li, moliĝante.—Je mia konscienco: por duono da rublo mi ne povas, sed mi fidas al via prudento... diru vi mem,

kiom ĝi valoras, kaj mi konsentos. Mi eĉ preferas malgajni, por ke nur fariĝu tio, kion vi deziras.

— La veŝto valoras kvindek groŝojn<sup>1)</sup>, kaj mi proponas al vi duonon da rublo.

— Duonon da rublo? nu, estu duono da rublo — li ekĝemis, enpuŝante la veŝton en miajn manojn. — Mi eĉ malgajnu, por ke mi nur ne bezonu denove kii... tia vento...

Kaj li montris per la mano la fenestron, post kiu kirliĝis neĝa nuboj.

Kiam mi estis prenonta monon, la komercisto, videble rememorinte pri io, elŝiris el miaj manoj la veŝton kaj komencis revizii ĝiajn poŝetojn.

— Kion vi serĉas tie?

— Eble mi forgesis ion en la poŝo, mi ne memoras — respondis li per plej natura tono kaj redonante al mi la acetaĵon, aldonis: — almetu, via moŝto, almenaŭ dek groŝojn.

— Nu, adiaŭ — mi respondis, malfermante la pordon.

— Mi ĵetas min al viaj piedoj. Hejme mi havas ankoraŭ unu tre bonan pelton.

Kaj elŝovinte ankoraŭ la kapon el post la pordo, li demandis:

— Eble via moŝto ordonos alporti ŝaflaktajn fromaĝetojn?

---

<sup>1)</sup> 1 rublo = 100 kopekoj; 1 kopeko = 2 groŝoj. (traduk).

Kelkajn minutojn poste li kriis denove en la korto: Mi komercas, komercas!. kaj kiam mi stariĝis ĉe la fenestro, li salutis min kun amika rideto.

Neĝo komencis faladi tiel dense, ke preskaŭ krepuskiĝis. Mi metis la veŝton sur tablon kaj komencis pensi jen pri la sinjorino, kiu eliris ekster la pordegon, mi ne scias, kien, jen pri la malplena loĝejo, troviĝanta apud la mia, jen pri tiu, super kiu surkreskas nun ĉiam pli dika tavolo da neĝo...

Ankoraŭ antaŭ tri monatoj mi aŭdis, kiel ili interparolis en unu belvetera septembra tago: En majo la sinjorino eĉ kantetis ion — li ridis, legante la „Festan Kurieron”. Sed hodiaŭ...

En nian domon ili translokiĝis en la komenco de aprilo. Ili leviĝadis frue, trinkis teon el lada samovaro kaj kune eliradis eksteren. Ŝi — al la lecionoj, li — en oficejon.

Li estis negrava oficisto, kiu kun tia admiro rigardis fakajn ĉefojn, kiel vojaĝanto — Tatrojn. Tial li devis multe labori dum la tutaj tagoj. Mi vidadis lin eĉ je noktomezo, klinitan ĉe lampo super tableto.

La edzino sidis ordinare apud li kaj kudris. Kelkfoje, rigardinte lin, ŝi ĉesigadis sian laboron kaj diradis per admona tono:

— Nu, sufiĉe da laboro. Iru dormi.

— Kaj kiam vi iros dormi?

— Mi... finos nur kelkajn stebojn.

— Nu, do mi ankaŭ skribos kelkajn liniojn.

Denove ili klinadis la kapojn kaj faris siajn task-

ojn. Kaj denove post kelka tempo diradis la sinjorino:

— Enlitiĝu, enlitiĝu.

Kelkfoje al ŝiaj vortoj respondadis mia horloĝo, batante la unuan.

Ili estis homoj junaj, nek belaj, nek malbelaj, ĝenerale trankvilaj. Kiel mi memoras, la sinjorino estis multe pli malgrasa, ol la edzo, kiu estis tute bonstatura rilate al tia malgrava ofico.

Ĉiudimanĉe, ĉirkaŭ tagmezo, ili iris promeni, tenante sin je la brakoj kaj revenadis hejmen malfrue vespere. Ili tagmanĝis certe eksterhejme. Unu fojon mi renkontis ilin ĉe la pordego, apartiganta la Botanikan Ĝardenon de Łazienki. Ili aĉetis du glasojn da bonega akvo kaj du grandajn mielkukojn, havante ĉe tio trankvilajn fizionomiojn de urbanoj, kiuj kutimas manĝadi ĉe la teo varman ŝinkon kun kreno.

Ĝenerale malriĉaj homoj nemulte bezonas por subteni sian spiritan egalpezon. Iom da nutraĵo, multon da laboro kaj multon da sano.

Al miaj najbaroj, kiel ŝajnas, ne mankis nutraĵo, kaj almenaŭ ne laboro. Sed la sano ne ĉiam estis bonstata.

En julio la sinjoro iel malvarmumis, sed ne tre. Tamen — stranga kontrafo de cirkonstancoj — li ricevis samtempe tiel fortan sangelfluon, ke li eĉ perdis la konscion.

Tio okazis jam nokte. La edzino, kvietiginte lin en la lito, venigis en la ĉambron la gardistedzinon,

kaj mem kuris serĉi kuraciston. Ŝi demandis pri kvin, sed trovis nur unu, kaj tio estis eĉ okaze sur strato.

La kuracisto, rigardinte ŝin ĉe la lumo de flagranta lanterno, opiniis ĝusta antaŭ ĉio ŝin trankviligi. Ĉar ŝi momente ŝanceliĝadis kaj ne estis fiakro sur la strato, li donis al ŝi la brakon kaj, irante, klarigadis, ke sangelfluo ankoraŭ nenion pruvas.

— Sangelfluo povas esti el la laringo, el la stomako, el la nazo; el la pulmoj — nur malofte. Cetere, se la homo ĉiam estis sana, neniam tuisis...

— Ho, nur iajoje — ekflustris la sinjorino, haltante por ekkapti la spiron.

— Se iajoje, ĝi estas ankoraŭ nenio. Li povas havi facilan kataron de la bronkoj.

— Jes, ĝi estas kataro! — ripetis la sinjorino, jam laŭte.

— Li neniam havis pulminflamon?

— Li havis — respondis la sinjorino, denove haltante.

Ŝiaj piedoj iom ŝanceliĝis.

— Jes, sed certe antaŭ tre longe — kontinuis la kuracisto.

— Ho, antaŭ [tre longe — ŝi jesis rapide — ankoraŭ la pasintan vintron.

— Antaŭ unu kaj duono da jaro,

— Ne, sed ankoraŭ antaŭ la Nova Jaro... ho, antaŭ tre longe!

— Ho, kiel malluma strato ĝi estas, kaj la ĉielo estas iom nuba — parolis la kuracisto.

Ili eniris la domon. La sinjorino timeme demandis la gardiston, ĉu nenio okazis, kaj ŝi eksciis, ke nenio. En la loĝejo la garditedzino ankaŭ diris al ŝi, ke okazis nenio, kaj la malsanulo dormetis.

La kuracisto delikate vekis lin, esploris, kaj antaŭdiris, ke ĝi estas nenio grava.

— Mi tuj diris, ke ĝi estas nenio -- ekparolis la malsanulo.

— Ho, nenio! — ripetis la sinjorino, premante liajn ŝvitkovritajn manojn. — Mi ja scias, ke sangelfluo povas esti el la stomako aŭ el la nazo. Ĉe vi ĝi estis certe el la nazo. Vi estas tiel grava, bezonas movadon, kaj vi ĉiam sidas. Ĉu ne vere, sinjoro doktoro, ke li bezonas movadon?

— Jes, jes, movado estas ĝenerale necesa, sed via edzo devas kelkajn tagojn resti en la lito. Ĉu li povus veturi kamparon?

— Li ne povas — ekflustris malgaje la sinjorino.

— Nu, negrave. Li restos do en Varsovio. Mi lin vizitados; dume li kuŝu kaj ripozu. Kaj se la sangelfluo ripetiĝus... — aldonis la kuracisto.

— Tiam... sinjoro? — demandis la edzino, paligante, kvazaŭ vakso.

— Nu, nenio. Via edzo ripozos, tie cikatriĝos...

— Tie... en la nazo? — parolis la sinjorino, kunmetante la manojn antaŭ la kuracisto.

— Jes... en la nazo! Kompreneble. Trankviliĝu, sinjorino, kaj la ceteron konfidu al Dio. Bonan nokton.



La vortoj de la kuracisto tiel trankviligis la sinjorinon, ke post la teruro, kiun ŝi travivadis de kelkaj horoj, ŝi iĝis preskaŭ gaja.

— Nu, kio grava ĝi estas? — diris ŝi, iom ridetante, iom ploretante.

Ŝi surgenuiĝis apud la lito de la malsanulo kaj komencis kisi liajn manojn.

— Kio grava? — ripetis mallaŭte la sinjoro kaj ridetis. Tiom da sango elfluas el homo dum milito, kaj tamen li estas poste sana!

— Nur nenion parolu — petis lin la sinjorino.

Ekstere komencis krepuskiĝi. En somero, kiel oni scias, la noktoj estas tre mallongaj.

La malsano daŭris multe pli longe, ol oni antaŭe supozis. La edzo ne iradis jam en la oficejon, kio kaŭzis al li tiom malpli da embaraso, ke, kiel dungito, li ne devis preni forpermeson kaj povis reveni, kiam ajn plaĉus al li, kaj — se li retrovus la oficon. Ĉar, restante hejme, li fartis pli bone, la sinjorino havigis al si ankoraŭ kelkajn lecionojn kaj per ilia helpo kontentigadis la hejmajn elspezojn.

Ŝi eliradis ordinare eksteren je la oka matene. Ĉirkaŭ la unua ŝi revenadis por kelkaj horoj hejmen por kuiru al la edzo tagmanĝon sur maŝineto, kaj poste ŝi ree elkuradis por kelka tempo.

Sed la vesperojn ili pasigadis kune. Kaj la sinjorino, por ne mallabori, akceptadis iom pli da kudrotajo.

Iam, en la fino de aŭgusto, la sinjorino renkontiĝis sur strato kun la kuracisto. Longe ili pro-

menis kune. La sinjorino ekkaptis la manon de l'kuracisto kaj diris per petega tono:

— Tamen, viaflanke, vizitadu nin. Eble Dio permesos... Li tiel trankviliĝas post ĉiu via vizito!

La kuracisto promesis kaj la sinjorino revenis hejmen, kvazaŭ plorinte. Ankaŭ la sinjoro, sekve de la deviga sidado, iĝis facile incitebla kaj dubema. Li komencis riproĉi al la edzino, ke ŝi estas tro zorgema pri li, ke li malgraŭ tio mortos, kaj fine li demandis:

— Ĉu la kuracisto ne diris al vi, ke mi ne vivos pli, ol kelkajn monatojn?

La sinjorino rigidiĝis.

— Kion vi diras? de kie venas al vi tiaj pensoj?

La malsanulo ekscitiĝis.

— Hoo, venu al mi, ĉi tien! — li parolis kolere, kaptante ŝiajn manojn. — Rigardu rekte en miajn okulojn kaj respondu: ĉu la kuracisto ne diris tion?

Kaj li fiksis sur ŝi la incititan rigardon. Ŝajnis al li, ke sub tiu ĉi rigardo eĉ muro elflustrus la sekreton, se ĝi posedus ĝin.

Sur la vizaĝo de la virino montriĝis stranga trankvilo. Ŝi ridetis kviete, elportante tiun sovaĝan rigardon. Nur ŝiaj okuloj kvazaŭ vualiĝis per vitro.

— La kuracisto diris — ŝi respondis — ke ĝi estas nenio, ke vi devas nur iom ripozi.

La edzo lasis ŝin, komencis tremi kaj ridi; poste, svingante la manon, li diris:

— Nu, vidu, kiel nerva mi estas. Mi obstine

pensis, ke la kuracisto ekdubis pri mi... Sed vi konvinkis min... mi estas jam tute trankvila!

Kaj ĉiam pli gaje li ridis pro siaj imagoj.

Cetere, tia atako de suspektemo neniam plu ripetigis. La serena trankvilo de la edzino estis ja plej bona signo por la malsanulo, ke lia stato ne estas malbona.

Kial ĝi devus esti malbona?

Li tuis verdire, sed tio estis pro kataro de la bronkoj. Kelkfoje, sekve de la longa sidado, montrigadis sango — el la nazo. Nu, li havadis ankaŭ kvazaŭ febron, sed, ĝustadire, tio ne estis febro, nur — tia nerva stato.

Ĝenerale li fartis ĉiam pli bone. Li sentis nenvenkeblan sopiron al iaj malproksimaj ekskursoj, sed mankis al li fortoj. Venis eĉ tempo, ke li ne volis kuŝi tage en la lito, li nur sidis sur seĝo, vestita, preta por eliri — se lin nur forlasus tiu momenta senfortiĝo.

Sed maltrankviligis lin nur unu detalo.

Iun tagon, surmetante la veŝton, li eksentis, ke ĝi estas tre vasta.

— Ĉu mi tiagrade malgrasiĝis? — li ekflustris.

— Nu, kompreneble, ke vi iom malgrasiĝis — respondis la edzino. — Sed oni ne devas ja troigadi...

La edzo rigardis ŝin atente. Ŝi ne fortiris eĉ la okulojn de sia laboro. Ne, tiu trankvilo ne povis esti ŝajnigita. La edzino scias de la kuracisto, ke li ne estas ja tiel tre malsana, do li ne havas motivon por ĉagreniĝi.

En la komenco de septembro la nervaj statoj similaj al febro, okazadis ĉiam pli intense, preskaŭ dum tutaj tagoj.

— Ĝi estas malgravaĵo — parolis la malsanulo. — Ĉe la trapaso de somero al aŭtuno eĉ al plej sanaj homoj okazas iaj statoj de incititeco, ĉiu estas malsaneta. Sole tio mirigas min: kial mia veŝto kuŝas sur mi ĉiam pli libere? Mi videble terure malgrasiĝis kaj nature mi ne povos esti sana, antaŭ ol mi pligrasiĝos. Tio estas certa.

La edzino atente aŭskultis ĉi tion kaj devis konfesi, ke la edzo estas prava.

La malsanulo ĉiun tagon leviĝadis el la lito kaj vestadis sin, kvankam sen helpo de la edzino li povis surtiri neniun parton de la vesto. Per sia insistado ŝi almenaŭ tion elpetis, ke li ne metis supren surtuton, sed palton.

— Kaj oni miras — li parolis kelkfoje, rigardante en spegulon — kaj oni miras, ke mi ne havas forton. Sed kiel mi aspektas!

— Nu, la vizaĝo ĉiam facile ŝanĝiĝas — interromtis la edzino.

— Vere, sed mi ankaŭ entute malgrasiĝas...

— Ĉu ĝi ne ŝajnas al vi? — demandis la sinjorino kun akcento de granda dubo.

Li enpensiĝis.

— Ha, eble vi estas prava... Ĉar eĉ... de kelkaj tagoj mi rimarkas... ke iel... mia veŝto...

— Lasu do! — interrompis la sinjorino — vi ja ne grasiĝis.

— Kiu scias? Ĉar laŭ la veŝto... mi rezonas ke...

— Tiuokaze devus revenadi viaj fortoj.

— Ho, ho, vi tuj ĝin volus... Antaŭe mi devas almenaŭ iomete grasiĝi. Mi eĉ diras al vi, ke kiam mi eĉ grasiĝos, ankoraŭ tiam ne tuj revenos miaj fortoj...

Sed kion vi faras tie post la ŝranko? — li demandis subite.

— Nenion. Mi serĉas en la kofro viŝtukon, kaj mi ne scias, ĉu ĝi estas pura...

— Ne streĉu tiel la fortojn, ĉar eĉ via voĉo ŝanĝiĝas. Ĝi ja estas multepeza kofro.

Efektive, la kofro devis esti pezega, ĉar sur la vangoj de la sinjorino aperis eĉ ruĝo. Tamen ŝi estis trankvila.

De tiu tempo la malsanulo ĉiam pli zorge atentis sian veŝton. Ĉiam post interrompo de kelkaj tagoj li vokadis al si la edzinon kaj diradis:

— Nu, rigardu! Konvinkigu mem. Hieraŭ mi ankoraŭ povis meti tien la fingron, jen, ĉi tien... Kaj hodiaŭ mi jam ne povas. Mi efektive komencas pli-grasiĝadi!

Sed unu tagon la ĝojego de la malsanulo ne havis plu limojn. Kiam la edzino revenis de la lecionoj, li salutis ŝin kun brilegantaj okuloj kaj diris, tre kortuŝite:

— Aŭskultu min: mi diros al vi unu sekreton. Vi komprenas — kun tiu ĉi veŝto mi iom friponis. Por vin trankviligi, mi kuntiradis mem ĉiutage la

zoneton, kaj tial la veŝto estis malvasta. Tiamaniere mi tiris hieraŭ la zoneton ĝis la fino. Mi jam ĉagreniĝis, pensante, ke la sekreto perfidiĝos, kaj du-me hodiaŭ... Ĉu vi scias, kion mi diros al vi? Hodiaŭ — mi donas al vi plej sanktan vorton — anstataŭ kuntifi la zoneton, mi devis ĝin iom vastigi! Estis al mi vere malvaste, kvankam hieraŭ estis ankoraŭ iomete pli vaste... Nu, nun ankaŭ mi kredas, ke mi estos sana... Mi mem! La kuracisto pensu, kion li volas.

La longa parolado tiel lin senfortigis, ke li devis reiri sur la liton.. Tamen tie, kiel homo, kiu sen kuntirado de la zonetoj komencas grasiĝadi, li ne kuŝiĝis, sed apogis sin, kiel en apogseĝo, en la brakoj de la edzino.

— Nu, nu, — li flustris — ĉu oni tion esperus? Du semajnojn mi trompis mian edzinon, ke la veŝto estas malvasta, kaj hodiaŭ ĝi mem estas efektive malvasta! Nu, nu!

Kaj ili sidis, premante sin unu al la alia, la tutan vesperon.

La malsanulo estis kortuŝita, kiel neniam antaŭe.

— Mia Dio! — li flustris, kisante la manon de la edzino.— Kaj mi pensis, ke mi jam tiel malgrasiĝados... ĝis la fino. De du monatoj nur hodiaŭ la unuan fojon mi ekkredis je tio, ke mi povas esti sana. Ĉar ĉe malsanulo ĉiuj mensogas, kaj plej multe— la edzino. Sed la veŝto— ĝi ne mensogas!

Hodiaŭ, rigardante la malnovan veŝton, mi vidas, ke pri ĝiaj kuntiriloj okupis sin du personoj. La sinjoro ĉiutage antaŭenŝovadis la bukon, por trankviligi la edzinon, kaj la sinjorino ĉiutage mallongigadis la zoneton — por kuraĝigi la edzon.

— Ĉu ili iam kuniĝos ree por konfesi al si reciproke la tutan sekreton pri la veŝto? — mi pensis, rigardante la ĉielon.

La ĉielo jam estis preskaŭ nevidebla super la la tero. Faladis nur neĝo tiel densa kaj malvarma, ke eĉ en tomboj frostiĝis homaj cindroj.

Tamen kiu povas diri, ke post tiuj nuboj ne estas suno?

Faint, illegible text, possibly bleed-through from the reverse side of the page. The text is arranged in several lines and is difficult to decipher due to its lightness and the texture of the paper.



NOVA LERNOLIBRO PRILABORITA LAŬ  
ORIGINALA SISTEMO

# Esperanto per Esperanto

Leono Vienano

Lernolibro de la lingvo Esperanto laŭ senpera (rekta)  
metodo.

Kun metoda enkonduko.

La sistemon de tiu ĉi libro formas kvar jenaj postuloj pedagogiaj:


1) eblo de instruado laŭ senpera metodo (t. e. ne uzante tradukan lingvon) konformigita al plenkreskuloj sen iuj ajn iloj aŭ specialaj ilustraĵoj helpe de ordinaraj objektoj, kiuj troviĝas en ĉiu preskaŭ ĉambro, tono, simplaj movoj kaj gestoj.

2) por eviti la enuigan sistemon de apartaj frazoj ne interligitaj per iu komuna senco, troviĝas eĉ en la komencaj lecionoj facilegaj rakontoj, kies primitiva stilo respondas precize la gramatikajn kaj vortajn sciojn de la lernanto en koncerna leciono.

3) en ĉiu rakonto troviĝas nur tiaj formoj gramatikaj, kiajn la lernanto jam ekkonis en la antaŭaj lecionoj.

4) la gramatiko estas klarigata laŭ indukta metodo, t. e. el specialaj ĉapitroj gramatikaj la lernanto mem konkludas koncernajn regulojn.

Kiel oni povas facile konkludi el la kvar supre menciitaj punktoj de la sistemo, ne intencis la aŭtoro sole pligrandigi la nombron da tiomaj lernolibroj kaj ĉiuspecaj memlerniloj, sed kiel sperta pedagogo li prilaboris originalan sistemon por instruado de la lingvo al plenkreskuloj laŭ senpera metodo.





## PREZARO

	<b>sv. fr.</b>
<i>ESPERANTO per ESPERANTO</i> (Leono Vienaro)	1.—
<i>NOVELO</i> Nr. 1. <i>EKSIĜO</i> (N. Jeruŝalmi)	0.45
<i>NOVELO</i> Nr. 2. <i>LA VIZIO. LA</i> <i>VEŜTO</i> (B. Prus)	0.45
<i>NOVELO</i> Nr. 3. <i>LA MISTERO.</i> <i>UNU HORO.</i> (P. Romanov)	0.45

Kiu mendas 5 novelojn, ricevas la sesan  
senpage kaj sendon senkostan.

NI LIVERAS NUR POST ANTAŬPAGO.

Ni akceptas ankaŭ poŝt-aŭ U. E. A.-respondkuponojn.

Ĉe ni estas haveblaj diversaj esperantaĵoj.

---

LIBREJO

**N. SZAPIRO**

**Warszawa, Nowolipki 8.**

---

POLA POŝTĈEKKONTO: 16,562.